

Reformo de la esperanto-instruado, 5-a parto
Claude Gacond, 180-a radioprelego, 1967.03.22 & 1967.03.25

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni vidis la avantaĝon de la lingvolaboratorio por la instruado de nia lingvo. Hodiaŭ ni prezentos la avantaĝon de la programita instruado.

A.- La ĉefa problemo por la esperanto-instruado troviĝas en la diverseco de la kapabloj kaj laboremo de la gelernantoj. En ĉiu kurso, kiam gelernantoj kapablas kompreni, kion ili legas, aliaj apenaŭ povas deĉifri kelkajn vortojn.

Cl.- La kolektiva instruado nur tedas la rapidemulojn kaj senkuraĝigas la ceterulojn. Kaj tiu problemo akriĝas, kiam la profesoro estas bona pedagogo. Ĉar li entuziasmigas la gelernantojn, novulojn sin prezentas por eksekvi la kurson. Ĉu ilin oni povas akcepti? Jen tikla demando.

A.- Ŝajnas, ke la nova instru-tekniko programado alportas solvon al tiuj fakte teknikaj demandoj. Ĝi malŝarĝas la profesoron de la tasko instrui kaj ebligas kompletan individuigon de la instruado.

Cl.- Do la rapidemuloj povos rapidi sen malhelpi la aliajn pli lante progresi. Kaj testoj regule kontrolas la konojn de la gelernantoj. Ili indikas al la profesoro, kion devas trastudi ĉiu kursano. Kondukante al komplementaj ekzercoj, ili evitas akiron de malbonaj refleksoj.

A.- Esperanto-Edukistaro de Svislando nun programas elementan kurson de esperanto por franclingvanoj. La personoj, kiujn tiu laboro interesas, retroviĝas dum semajnfinoj en la lernejo de la vilaĝo La Sagne por elprovi la ĵus redaktitajn ĉapitrojn, kalkuli la radik-oftecon en tekstoj uzotaj, redakti taŭgajn ekzercojn kaj diskuti pri la instruado de esperanto.

Cl.- Programi, tio ne signifas nur verki, sed atentege elprovi. Tiu elprovado ĝenerale mankas dum la verkado de klasika kurso. Pro tio la klasikaj kursoj havas ofte gravajn mankojn. La laboro de la instruantoj estas aldoni la klarigojn, kiuj ne troviĝas en la kurso, por eviti, ke la gelernantoj tro rimarku la mankojn. Mia rigardo ŝajnas al vi iom severa, sed tamen ĝi bone priskribas la realecon. Kiam oni deziras vidi la gelernantojn mem lerni, oni devas forlasi la klasikajn lernolibrojn tro mankhavajn kaj ellabori pli sisteme gradigitajn ekzercojn. Oni devas programi la lernadon.

A.- Bona programita kurso avantaĝe anstataŭas la pedagogian gimnastikadon de profesoro. Sed tiam ĝi devas ĉion instrui. Pro tio ĝia ellaborado kondukas al longa antaŭredakta studperiodo. Sistema esploro malkovrigas la stud-objektojn. Analizo studas, kiajn refleksojn devos akiri la lernantoj por asimili tiujn instru-objektojn, kaj en kia vico ili devos aperi.

Cl.- Granda principo de la programita instruado estas, ke la lernanto devas mem respondi al ĉiuj demandoj. Alia principo estas, ke plej ofte la respondoj de la lernantoj devas povi esti korektaj. Eraroj nenion instruas. Kontraŭe ili senkuraĝigas kaj kondukas al akiron de negativaj refleksoj. Do la eraroj devas esti evitataj kaj kiel eble plej rapide korektataj.

A.- Programita kurso sin prezentas, kiel sekvo de demandoj kaj respondoj. Kie kolektiva instruado ebligas nur al kelkaj lernantoj aktive partopreni la dialogon demandoj-respondoj, la programita instruado permesas al ĉiuj lernantoj aktive partopreni la dialogon.

Cl.- Unu horo dediĉita al programita instruado signifas por ĉiu lernanto unu horon de intensa laboro. Ĉiu lernanto devas respondi al ĉiuj demandoj. Tuja kontrolo ebligas eviti la akiron de falsaj refleksoj.

Reformo de la esperanto-instruado, 5-a parto
Claude Gacond, 180-a radioprelego, 1967.03.22 & 1967.03.25

A.- La profesoro ne plu instruas. Li superrigardas la laboron kaj intervenas en la taŭgaj momentoj. Li disdonas la studendajn ĉapitrojn, la sonbendojn, la legaĵojn kaj testojn. Li montras, kiel funkcias la magnetofonoj kaj kiel memkontroli siajn respondojn. Li fariĝas konsilanto, helpanto, teknikisto.

Cl.- Sur paĝo de programita kurso oni unue rimarkas multajn horizontalajn liniojn. La lernanto ricevas kartonan slipon, kiu ebligas kaŝi ĉion, kio troviĝas sub la unua horizontala linio.

A.- Tiam la lernanto trovas klarigon kaj demandon kaj lokon por respondi. Li skribas sian respondon.

Cl.- Tiam li ŝovas suben ĝis la sekvan linion la kartonan kaŝilon. Kaj li trovas la korektan respondon al la ĵus legita demando. Li do povas mem kontroli kaj korekti sian respondon.

A.- Tiam li trovas novan klarigon kaj demandon kaj lokon por respondi. Li skribas sian respondon.

Cl.- Ŝovo ĝis la venonta horizontala linio permesas kontrolon de la respondo kaj kondukas al nova klarigo kaj al nova demando.

A.- Demandon post demando la lernanto tiel malkovras laŭ propra ritmo la stud-objekton. Ĝojo akompanas tiun malkovron.

Cl.- Ĝenerale programita ĉapitro komenciĝas per testo. Lernanto, kiu ĝin sukcesas, ne bezonas respondi al ĉiuj demandoj. Li saltas al la ĉefdemandoj. Malsukcesintoj kontraŭe ricevas konvenan instruadon, kiu helpas ilin kompreni la ĉefajn demandojn.

A.- Por doni ekzemplon ni prezentu la trastudon de la unua ĉapitro de la kurso, kiun nun redaktas Svisa Edukistaro de Svislando. Ĝi instruas pri la nomo, artikolo kaj pluralo.

Cl.- La demando unua kontrolas, ĉu la lernanto scias, kio estas nomo. Sukceso en tiu testo signifas salton al la demando 17-a, do fakte ŝparon de 16 demandoj. Malsukceso signifas trastudon de tiuj 16 demandoj, kiuj klarigas, kio fakte estas nomo. Do lernanto, kiu havas solidajn gramatikajn konojn, ne devas perdi sian tempon, li kuras antaŭen al la ĉefdemandoj, kaj tuj lernos, ke komuna nomo en esperanto finiĝas per **o**. Sed multaj homoj unue devas lerni, kio estas komuna nomo. Nur poste ili povos asimili la stud-objekton.

A.- Ĉiu programita ĉapitro finiĝas per aŭtokorektaj ekzercoj. Kiam la lernanto havas la impreson aŭ eĉ la certecon esti kompreninta la studobjekton, li iras al la profesoro kaj ricevas teston.

Cl.- Tiu testo indikas al la profesoro, ĉu la lernanto kapablas entrepreni la studon de nova ĉapitro, aŭ ĉu li devas unue ricevi komplementajn ekzercojn. Tiuj komplementaj ĉapitroj estas tre gravaj. Ili permesas evitigi al la lernantoj la akiron de malbonaj refleksoj.

A.- Programita instruado estas instruado science gradigita. La profesoro ĉesas ludi la rolon de aktoro kaj fariĝas teknikisto, kiu gvidas, konsilas, helpas.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-